

ITALA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA ITALIANO)

Organo Ufficiale della FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

ABBONAMENTO ANNUO	
Italia	L. 10,05
Estero	» 15,05
Abbonamento sostenitore	» 20,05

Un Numero L. 1

JARA ABONO	
Italajo	L. 10,05
Eksterlande	» 15,05
Helpabono	» 20,05

Direzione ed Amministrazione
 presso la Sede della Federazione Esperantista Italiana - Via Rossari, 2, Milano (Italia)



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEĜNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Autuna foiro 1921 de la 28^a de aŭgusto ĝis 3^a de septembroPrintempa foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

La centra merkato por la internacia
 komerco kaj ofertado

Same grava por eksportantoj kaj por aĉetantoj

Informoj donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN

IN LEIPZIG

(Fojoficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

MANIFATTURE MAFFI - MILANO
CINGHIE

ARTICOLI TECNICI Via F. Casati, 17
FORNITURE INDUSTRIALI Telef. 20-844

MANUFARTUROJ MAFFI - MILANO
RIMENOJ

TEKNIKAJ ARTIKLOJ POR INDUSTRIAJ
Via F. Casati, 17 FABRIKEJOJ Tel. 20-344

BELLISSIMI DISTINTIVI SMALTATI
SPILLE, BOTTONI, ecc.

tiene a disposizione la SOCIETÀ ESPERANTISTA SAMPIERDARENESE

Rivolgersi: A. CLAVENNA

Via Varese, 8 - SAMPIERDARENA

G. GUASTALLA Kaj K.

ITALIO - 8, Strato Tommaso Grossi - MILANO

GRANDA MAGAZENO DE

DONACARTIKLOJ

LASTAJ NOVAJHOJ JE

VENTUMILOJ - SUNOMBRELOJ - VALIZETOJ

PORCELANAJHOJ UNUAMARKAJ

SPECIALAJO JE KORNICOJ

POR BONE ACETI

TUKOJN kaj TRIKOTOJN

POR SINJORINOJ KAJ SINJOROJ
ĈIUJ DEVAS IRI ĈE

F. FINZI

EN

Nordaj Portikoj - MILANO (Italujo)
Placo Duomo, 25 - Telefono 4760

Tarifo de la reklamo

Unua	pago	300	lirojn	—	1/2	150	—	1/4	100	—	1/8	50
Kvara	»	250	»	—	»	150	—	»	80	—	»	40
Dua aŭ tria	»	150	»	—	»	80	—	»	50	—	»	25

Por tri aŭ pli ol tri enpresigoj oni faras specialajn rabatojn.

ITALA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA ITALIANO)

Organo Ufficiale della FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn stile, sed ne enhave. Demandante ion de la redakcio, bonvolu alsendi respondkuponon. Niaj kunlaborantoj estas petataj skribi tre legeble, plej bone per skribmasino kaj ciam sur unu flanko.

ENHAVO. — Il XIII Congresso Internazionale d'Esperanto a Praga — Tutmonda monokolekto por monumento al D-ro Zan enhof. — Malgranda Mondo — Alvoko de Rusaj Esperantistoj — Esperanta Kroniko — Librej Ricevitaj — La «Partita a Scacchi» in Esperanto — Relazione Morale e Finanziaria dell'Istituto Lombardo d'Esperanto — Esperantujo — Varie.

Il XIII Congresso Internazionale di Esperanto a Praga

Congresso veramente riuscito! per concorso di aderenti, per la constatazione del lavoro già fatto, per i programmi formulati circa il lavoro da farsi, per la fede manifestata, per l'entusiasmo che ha caratterizzato tutto lo svolgersi del Convegno. Qui avrei voluto gli scettici, che sono ancora i più! li avrei voluti a far capo fino nella maestosa Sala delle Rappresentazioni di Praga, gremita di uomini di ogni paese all'apertura del Congresso: li avrei voluti presenti alle riunioni degli uomini d'affari, degli scienziati, dei professionisti, che diedero forma reale di propositi a quelle che si sarebbero potute chiamare «belle parole», — e gli scettici vi sarebbero fatti fedeli.

Ma veniamo alla cronaca. Prima osservazione: l'organizzazione locale è stata magnifica: ne sia data lode ai br. vi Samideani di Praga, che si affaticarono, e con successo, a dare ad ogni convenuto la più cordiale e più pratica accoglienza. Vi è nella stazione Wilson di Praga un ufficio del Congresso, il primo che incontro arrivando, ove si ha subito l'impressione dell'importanza del convegno. M'informano che gli aderenti sono più di 240) e più di 40 Nazioni saranno rappresentate. All'Isola Sofia, lungo le acque giallastre della larga Moldau, sono

installati gli altri uffici del Congresso: e così abbiamo la prima riunione, la sera di sabato 30 Luglio, col saluto del rappresentante Finlandese. (Costui, senza tanti preamboli, c'invita per il prossimo Congresso, a Helsingfors. — GIS REVIDO! —)

Seconda osservazione: le autorità locali. Municipio e Governo, sono state larghe di plauso e di appoggio al Comitato Promotore, colla concessione della gran Sala delle Rappresentazioni, di altri locali, e con molte facilitazioni ai Congressisti. — Gli uomini portanti per distintivo la verde stelletta e il segno del Congresso sono dovunque ben visti dai cittadini di Praga: in molti negozi si parla esperanto, e alcuni ritratti del Maestro sono esposti nelle vetrine.

Dal Palazzo Municipale sventola, tra la bandiera cittadina e la repubblicana, lo stendardo dell'Esperanto.

Siamo a domenica, giorno dell'apertura del Congresso: sala, come dicevo, affollatissima. — Sul palcoscenico, nello sfondo, appare la statua di Samenhof: prendono posto i designati alla presidenza, e attorno le rappresentanze.

Chi potrà dimenticare la solennità dell'inizio, quando, alla maestosa voce dell'organo, tutti i congressisti, in piedi, han-

intonato l'inno dell'Esperanto?— Attraverso quel coro mi sembrava che l'idea della fraterna comunità dei popoli fosse assurta alla forma concreta di cosa reale.

Il discorso di apertura è fatto da Issbrucker, presidente dell'ultimo congresso universale, tenuto all'Aia. — Si procede in seguito alla nomina dell'ufficio di presidenza, di cui fanno parte Susta, Ministro dell'Istruzione pubblica, e Rotnagl, Sindaco supplente di Praga: Poi il Prof. Kamaryt, che funge da presidente; e Arnhold, vice presidente; infine Pittik, segretario generale.

Parla Susta, che ringrazia e saluta i congressisti, a nome del governo Cecoslovacco: poi Rotnagl, a nome di Praga.

A Kamaryt, che fa il rapporto del comitato permanente del Congresso, segue un magnifico discorso del Privat, vice presidente della U. E. A.: egli volge parole di augurio e di compiacimento alla repubblica Ceco-Slovacca; Saluta la vedova di Samenhof, che siede commossa in un palco; e viene poi a parlarci della bellezza dell'ideale esperantista, destinato a tramutarsi per fede e per costanza di uomini in magnifica realtà. — E' interrotto e salutato da vivi applausi.


Si mandano telegrammi a Masaryk e a Benés. — Quest'ultimo ha fatto pervenire un nobile messaggio, che viene letto dal Segretario. — Portano ora il saluto al Congresso i rappresentanti ufficiali delle Nazioni, tutti accolti da vivi applausi. — Successivamente, NITOBÉ, vice-segretario generale dalla Società delle Nazioni, in un discorso fatto in inglese, e tradotto poi in Esperanto da Privat, dichiara di essere delegato della Società delle Nazioni a fornire un rapporto sul Congresso: egli pensa che verrà giorno in cui la questione dell'adozione dell'Esperanto da parte della Società delle Nazioni sarà favorevolmente risol-

ta. — Sfilano da ultimo sul palchetto oratorio i delegati delle varie federazioni esperantiste. — La seduta ha termine, tra il più vivo entusiasmo alle 19 di poche ore di lavoro. — L'Esperanto è naturalmente la lingua ufficiale, che tutti hanno parlato, e tutti hanno compreso.

I giorni seguenti furono dedicati, come dicevo, alle riunioni partico'ari, che risultarono veramente proficue per lo scambio di vedute e d'intenti: i congressisti prefittarono in gran numero anche dei diversi passatempi, organizzati dal Comitato del Congresso, e ottimamente riusciti. —

Il Congresso può dirsi abbia avuto il migliore successo: il domani saprà mostrarci quanto cammino ancora si possa percorrere verso la meta dell'affratellamento dei popoli, attraverso l'Esperanto, lingua internazionale ausiliaria.

Dino Gentili.



Tutmonda monokolekto por monumento al Dro Zamenhof

Iniciatintoj: Prof. Th. Cart, Paris, generalo Sébert, Paris, Dro W. Robin, Varsovio, s-ro Ed. Stettler, Bern.

Organiza Komitato: S-ro J. M. Warden, Edinburgh, s-ro advokato W. M. Page, Edinburgh, honora kasisto, 31, Queen Street, s-ro J. D. Applebaum, Liverpool, honora sekretario, 11, Mayville Road, Mossley Hill.

La *Internacia Komitato* formiĝis, por kolekti la bezonatan monsumon per sistemo de kuponkartoj, kiuj vidigas la gravuritan portreton de la Majstro kaj klarigantan tekston. La karton ĉirkaŭas 20 kuponoj kun la sama bildo; ĉiu kupono valoras la dudekonon de la karto tiel, ke oni povos

akiri aŭ plenan karton aŭ kelkajn kuponojn.

En Varsovo starigis *Loka Komitato*, kiu prizorgos sub la kontrolo de la Internacia Komitato la konstruon kaj konservadon de la monumento. La iniciatintoj proponas al la XIIIa Internacia E.-Kongreso en Praha la jenan decidon:

« La XIIIa Internacia Kongreso de Esperanto en Praha decidus, ke estas necese konstrui taŭgan monumenton sur la tombo de Dro L. L. Zamenhof, la aŭloro de Esperanto, kaj rekomendas la projekton de la iniciatintoj al la sindona subteno de la tutmonda esperantistaro. »

Ĝis nun lia tombo en la hebrea enterigejo en Varsovio estas sen taŭga monumento. La celo de la nuna alvoko estas, havigi la subtenon de la esperantistoj por la monsumo bezonata por tiu memoraĵo. — Por la desegno de la monumento estos malfermata internacia konkurso, kaj la jam starigita komitato en Varsovio prizorgos la konstruigon. La projekto estas aprobita de s-ino Zamenhof kaj la familianoj de la Majstro.

Samideanoj, kiuj deziras sendi mondonacojn rekte al la honora kasisto, povas tion fari en sia nacia mono. Ili poste ricevos kvitance kartojn aŭ kuponojn laŭ la sumo donacita.

Kun helpo de la naciaj Esperanto-Asocioj kaj de la reprezentantoj de U. E. A. la kartoj kaj kuponoj estas disvendataj inter la esperantistaro kaj la simpatiuloj tra la tuta mondo.

MALGRANDA MONDO

En ĉia ero de la polvo dancanta tra l'aero; en ĉia ero de la tero premata per niaj piedoj; en ĉia guto de l'akvo fluanta tra la riveroj al la maro: ĉie, eĉ sur nia haŭto, eĉ en nia buŝo kaj eĉ en niaj internaĵoj vivas milionoj da milionoj da malgrandaj estaĵoj, kies ĉeeston ni eĉ ne suspektus, se ili ne pensus mem sin malkaŝi per siaj bonaj kaj malbonaj faroj Ili estas la **mikroboj**.

Ho! kian terurigan vorton mi skribis! Certe la leganto tuj ekmemoris nur pri malsanoj: ĥolero, pesto, tuberklozo, sifiliso, jam marŝas parade antaŭ la timigitaj okuloj de lia penso! Kaj vere, multe da malsanoj devenas de mikroboj; sed, male, kiom da bonaĵoj tiuj ĉi alportas al ni!

Se ĉiuj mikroboj mortus ĉu vi pensas, ke nur la kuracistoj devus plori, pro manko de malsanuloj? Ne, samideanoj: se tio ĉi okazus, ĉia vivaĵo-kaj eĉ la homoj-malaperus sur la tero. Kial?—La homo kaj la bestoj, kiel vi bone scias, ne povas vivi sin nutrante per tero, aero, mineralaĵoj; ili devas nepre manĝi aliajn bestojn aŭ kreskaĵojn. La kreskaĵoj, male, ne povas nutriĝi per viando aŭ per herbaĵoj; ili nepre bezonas akvon, mineralaĵojn kaj la gasojn de l'aero, kiujn ili kunigas kaj aliformigas je organikaj teksaĵoj per la suna lumo, pere de la klorofilo, kiu verdigas iliajn foliojn.

La kreskaĵoj, do, pereus (kaj sekve ankaŭ la bestoj kaj eĉ la homoj), se la mineralaĵoj organikigitaj de ili ne estus senĉese remineraligitaj, kiam, pro la tuta aŭ parta morto de la vegetaĵoj aŭ bestoj, al kies korpo ili

apartenas, ili revenas en la teron-kaj tian realformigon faras ĝuste la nekalkulebla kaj nevidebla armeo de la mikroboj!

Sed ankaŭ alimaniere tiuj ĉi malgrandegaj laboristoj helpas al ni. Preskaŭ ĉia dezirinda aŭ nedezirinda, aliformiĝo de la organikaj teksaĵoj okazas pro ilia agado: kaj multaj el niaj industrioj fondiĝas ĝuste sur tiaj aliformiĝoj. Tiel ni ŝuldas al la mikroboj la viniĝon de la mosto, la bieriĝon de la biermosto, k. t. p.; la vinagriĝon de la vino; la maceradon de la lino kaj de la kanabo; la maturiĝon de la fromaĝoj; la fermentadon de la panpastro, k. t. p., k. t. p.

Ni ne malbenu, do, ĉiujn mikrobojn nedistingante; kaj ni memoru, ke, se kelke da ili estas vere niaj plej malbonaj malamikoj, la plej multaj estas niaj plej karaj kaj necesagaj amikoj. (*Originale verkita*).

D. CARBONE.

Alvoko de Rusaj Esperantistoj

7 de aprilo 1921

KARAJ SAMIDEANOJ

mi sendas al Vi plej sinceran samideanan saluton el Rusa Respubliko post tiom da tempo ĉesigo de interrilatoj kun alilando. Kun malpacienco mi atendis tiun ĉi momenton denove korespondadi kun Vi. Mi sendas ankaŭ sinceran saluton al poŝtovicistoj-samideanoj de Italujo de mia rondeto esperantista de poŝtovicistoj kaj telegrafistoj. Nia movado sukcesas sufiĉe bone en mia lando, sed ne ĉiam sufiĉas lernolibroj kaj ni preskaŭ nenion scias pri nia movado en ali-

lando. Registaro kaj fakoj de Popola Klerigado multe helpas al nia laboro. Precipe forta kaj vigla estas E. movado inter oficistoj kaj laboristoj de poŝto kaj telegrafo. En mia urbo estas rondeto kaj kursoj, kies gvidado estas mi. Sed multe malhelpas al nia laboro tio, ke ni nenion scias pri nia movado en alilando kaj ni multe bezonas sciigojn, informojn, ĵurnalojn p. k. il., vidaĵojn el via lando por propagando. Mi petas sendadi al mi propagandilojn, vidaĵojn, p. k. il., ĵurnalojn, informojn k. t. p. Mi faros la saman. Nun per unueco kaj solidareco ni atingos sukceson en nia komuna laboro.

Mi petas vin presi en ĵurnaloj de via lando jenan alvokon:

« S-ro V. Dobrovalskij, poŝtovicisto, Scheljabinsk Privokzalnaja, poŝta kontoro (Ruslando) deziras interŝanĝi i. p., vidaĵojn, ĵurnalojn-kaj petas propagandilojn. Mi korespondas pri ĉiuj temoj precipe pri nia movado kaj terkulturado. Bonvolu represi en ĉiuj ĵurnaloj ĉi tiun anoncon. »

Mi atendas baldaŭan favoran respondon de samideanoj de Italujo. Anoj de nia rondeto ankaŭ deziras korespondadi: leterojn bonvolu adresi al mi. Kun malpacienco nia rondeto atendas ĉion petatan.

Kun vera samideana saluto

V. Dobrovalskij.

Kiev, 25 de Junio 1921

Al Redakcio de « Itala Esperantisto »

Kieva Esperantista Societo « Verda Stelo », dezirante renovigi la rilatojn kun alilanda samideanaro, estas feliĉa u nuafoje post la Eŭropa milito saluti

ĝin. La plej grandan rolon en nia movado ĉiam ludis la internaciaj rilatoj, kiujn ni ĝis nun utiligi ne povis. Nun ĉiu vorto ricevota el eksterlando estos por ni treege kara kaj multvalora.

Fratoj de alilando! Ni atendas Vian respondon: ĉiu letero, poŝtkarto, ĵurnalo aŭ gazeto estos renkontita de ni ĝojege.

Do, skribu al ni, donu adresojn de korespondantoj, sendu al ni Viajn esperantistaĵojn.

Ĉiuj specimenoj de niaj eldonaĵoj estos al Vi niaflanke sendataj.

Kun samideana saluto

La Komitato de Kieva Esp. Societo
« VERDA STELO »
str. Funduklejevskaja, 32, 23
(Ucraina) KIEV

ESPERANTA KRONIKO

EN RUSIO.

PETROGRADO. - Dum la 1-5 de Junio en Petrogrado, Komitato de loka Esperantista Societo kunvokis la Tutruslandan Esper. konferecon. En tiu-ĉi konferenco partoprenis delegitoj el 70 diversaj urboj de Rusio, Siberio kaj Ukrainio proksimume 200 pers. Ĉeestis ankaŭ oficiala delegito de Ministerio de Popolklerigado el malproksima - Orienta Respubliko (el urbo ĉina).

Tiu ĉi konferenco estas dua postmilita. Dum konferenco Petrograda Societo «Espero» festis ankaŭ sian 30jaran jubileon de ekzistado (ĉar ĝi estas fondita en la jaro 1891). Tiu Societo nun organizas Instituton de Esperanto. Krom S.to «Espero» en Petrogrado ekzistas: Petrograda Espe-

ranta Informejo (= P. E. I.; ruse: PESBJURO), Unuiĝo de Junaj Esperantistoj, grupo de anarhiistoj-esperantistoj, grupo de esp.-poŝtistoj kaj Esperanta klubo.

P. E. I. estas fondita je la Januaro de 1 20: ĝis nun ĝi multe laboris por ĉiuj ruslandaj esp. organizaĵoj. Nun do P. E. I. reorganizigis por laboro precipe eksterlanda. Gvidantaj de P. E. I. estas: A. Pilev, P. Egorov kaj V. Kaĉalin. P. E. I. komunikadas al ĉiuj eksterlandaj organizaĵoj kaj apartaj Samideanoj, diversaj sciigojn (pri esper. movado, vivkondiĉoj k. t. p.) pri Rusio, Ukrainio kaj Siberio. Ĝi regule korespondados kun multaj ĉiulandaj esp. Societoj ĉiuteme kaj intersanĝas p. k. Por respondo oni akceptas: poŝtmarkn neuzitajn, eldonaĵojn k. t. p.

Adreso de P. E. I. estas: Petrogr. Esp. Inf. Rusio, Petrogrado, Fontanka 17.

Unuiĝo de Junaj Esper. estas fondita en la jaro 1921. Ĝi lokiĝas kune kun S.to «Espero». Prezidanto de Unuiĝo estas S.no G. Peterin, kiu multe laboras por nia afero.

Adreso de grupo de anarhiistaj-esperantistoj estas: Rusio, Petrogrado, Fontanka 17 al grupo «Liberecano».

Esperanta Klubo havas bonan loĝejon (Petrogrado, Italjanskaja 31) kaj oficistojn, kiuj ricevadas salajron de l' Registaro. Produktaĵoj por klubo oni ricevas ankaŭ de «Petrosovjet» (t. e. Sovjeto de urbo Petrogrado).

« Internacia movado por forigi militon » subtenas Esperanton.

La Anti-Militarista kaj Anti-Kapitalista Organizaĵo fondita antaŭ ne longe

en Anglujo kaj nomita « Internacia Movado por forigi Militon » jam publikigis eldonon en Esperanto de ĝia « Deklaracio Kontraŭmilita ». Esperantistoj rekonos la propagandan valoron de tiu ĉi decido, kaj tiuj, kiuj simpatias kun la celoj de la movado, mendu la deklaron kun aliĝiloj de

Fino Beatrice C. M. Brown, sekretario, No More War International Movement 23, Bride Lane, London, E. C. 4.

LIBROJ RICEVITAJ

Kalc = Kantareto Esperanta - Verlag Friedrich Ellersiek - Berlin.

B. Spero = La Urbo de belega Sensencaĵo - Eldonejo Ludwig Fries Leipzig.

Fulcher - Long = English - Esperanto - Dictionary = E. Marlborough e C. - 51 Old Bailey - London, E. C. 4.

D-ro A Möbusz = Vollständiges Lehrbuch der Welthilfssprache - Esperanto -

Otto Nemnich, Verlag, München und Leipzig. -

F. Pillath - Germanaj kantoj Esperantigitaj

Esperanto - Verlag, Friedrich Ellersiek - Berlin.

Fokaj Mikszatk - Herczeg - kaj Wolnar = Ses noveloj - P. Balkangi - Budapest, VI Hajos u. 15.

D-ro A. Möbusz = Dokumentoj de Esperanto. -

Esperanto - Verlag Friedrich Ellersiek Berlin S. 59

H. Hiene = Elektitaj Poemoj - tradukitaj de Friedrich Pillath Esperanto Verlag, Friedrich Ellersiek Berlin S. 59.

Doktr D'ekterle - La vendreda klubo - Ferdinand Hirt & Sohn - Leipzig.

D-ro H. Hoffmann = La Struvel-petro, esperanta traduko de J. D Applebaum - Literatura Instituto Rütten & Loening, Frankfurt a M.

Mikgelo Gesasimov = Monna Liza - tradukis N. V. Nekrasov - Ruslando Herson - Esperantista Societo M. S. Valentinov.

U. Pantrak = Die Welthilfssprache Esperanto in zwei Wochen. Bromberg - Druck von U. Dittmann.

Iosefo Giacosa = Shaludado - trad. de P. kaj R. Padulli =

A Manzoni - La pesto en Milano dum 1630 = Trad. de d-ro P. C. Monti.

Sac. Giovanni Abbratozzato = L'Esperanto e l'azione Cattolica. A. Paolet - S. Vito al Tagliamento (Udine - Italujo).

Hans Sappl - Kiel oni organizas Esp. Grupon - Karmeliterpl. 6, Graz (Austria).

K. Ossata = Perloj el la Oriento =

Eldonejo Esperanta Nippon Esperanto - Sya - Tokjo

Esperantista Centra Oficejo = **Esperantista Dokumentaro** - Dekdua Universala Kongreso - Paris, 51 Rue de Clichy.

Jiri Mahen - La koboldo Ondra Eldonejo. Moraviaj Esperanto - Pioniroj.

Eaubmann - Esperanto Krestomatio - Eldonejo «La Marto» Haida (Bohemio).

D-ro P. C. Monti - **Fundamenta Gramatiko de Esperanto.** = Instituto Lombardo d'Esperanto - Milano Via Rossari, 2

LA "PARTITA A SCACCHI" IN ESPERANTO

(dall' *Illust. Italiana*)

Ŝakludado - versione in esperanto della « Partita a Scacchi » del Giacosa (Ed. Paolet. S. Vito al Tagliam. L. 3)

Il *traduttore*, Piero Padulli, non è stato un *traditore*, come avviene nella più parte della versione dei nostri capolavori. La leggiadra commedia del Giacosa che è come il fiore della bellezza sorto sull'arbusto della scienza scacchistica, è stata interpretata fedelmente e nella forma e nel pensiero. Alla bella sonorità del martelliano a rima baciata corrisponde una meravigliosa fioritura di sentimenti.

L'opera, che sarà largamente diffusa all'estero, farà sentire come anche gli scacchi abbiano la loro... epopea e come, e nei secoli passati e nel nostro, l'Italia sia, anche in questo campo, maestra delle genti.

Istituto Lombardo d'Esperanto

Relazione Morale e Finanziaria

L'Istituto Lombardo di Esperanto comunica che nel corrente anno furono tenuti ben 16 corsi di Esperanto la maggior parte dei quali alla sede della *Esperanta Domo*. Questi corsi, (13 di 1° grado, 1 di 2° e 2 di 3° grado) furono frequentati da circa 300 samideani dei quali più di 200 superarono gli esami relativi.

Questo risveglio di attività, svoltosi d'accordo con l'Esp. Domo, giovò alle due istituzioni, tanto dal punto di vista morale che finanziario, e le rafforzò. Infatti l'Istituto mercè le sue diverse entrate (introiti corsi, offerte docenti, vendite varie ecc. ecc.) poté

provvedere al proprio impianto; alla stampa della « Fundamenta Gramatiko », dei diplomi nei vari gradi, dei diplomi di docenza e benemerenza, delle cartoline di propaganda di varie specie. Poté pure formare una discreta bibliotечina, comperare numerose pubblicazioni di propaganda dell'editore Paolet ed acquistare dal samideano Sac. Meazzini i diritti d'autore che permetteranno di procedere alla stampa del piccolo dizionario italiano-esperanto, tanto richiesto.

L'Istituto ha chiuso i conti de primo suo esercizio ed è lieto di esporre qui sotto il riassunto della propria attività:


ATTIVITÀ

Residuo attivo 1920	L. 294.—
Introiti Corsi	» 4571.—
Offerte docenti	» 1066.—
Vendite varie	» 571.—
Attività diverse	» 2162.70
Totale attività	L. 8664.70

PASSIVITÀ

Percentuali a docenti	L. 991.50
» all'Esp. Domo	» 704.—
Segreteria (1/2 diritti fissi)	» 266.50
Spese diverse (stampa F. G., diplomi, cancelleria acquisti vari)	» 3992.45
Totale passività	L. 5954.45
A pareggio: L. 2162.70	
attività diverse e lire 547.55 residuo cassa	L. 2710.25
Totale	L. 8664.70

Il Segretario - Cassiere I. PIATTI.



Esperantujo

21 anoj de la pariza akademio sciencia publike esprimis la deziron, ke pro la sciencia progreso Esperanto estu enkondukata en ĉiujn le nejojn kaj ke la sciencistoj kaj teknikuloj prezentu siajn verkojn tutmondajn en Esperanto.

En Herson, Ĉerepovec kaj Serpuĥov (Rusio) la komisarejo de nacia klerigado donis po 200000 rublojn por ebligi kursojn por insruĵoj. En Saratov oni instalas Esperanto-muzeon kaj -bibliotekon.

La « Hina Esperantisto », organo de hinaj anarhistoj-komunistoj, aperis. Shanghai, 12 Boone Rd. — Same la « Belga Esperantisto » reaperas.

La Ĝenerala Asocio neŭtrala de Studentoj havas en sia organo « Gand Universié » internacian rubrikon kaj petas, ke ĉiulandaj esperantistaj studentoj partoprenu skribante.

Prezidanto de Internac. Ligo de Esperantist. Poŝtoficistoj estas Otto Reber en Bamberg (Germ.)

La nova hina ambasadoro en London, s.ro Koo, deklaris ke lia grandega lando bezonas tiel facile lerneblan lingvon kiel Esperanto, por interkomuniki kun okcidento, kaj li precipe konsilas siajn samlandajn studentojn lerni Esperanton.

Lord Robert Cecil paroladante en Huddersfield (23. 2. 21.) tre rekomendis, ke Esperanto estu la oficiala naciroliga lingvo.

Domenica 10 u. s. dopo l'assemblea all'Esperanta Domo fu aperta una sottoscrizione **pro Vessillo** che fruttò subito le seguenti offerte:

Ippolito Piatti 5 — Antonietta Piatti 5
 — Capponi Maria 5 — Mainardi 5 —
 Fratelli Rigamonti 5 — Busso 5 —
 Rosa 1. Magnoni 1 — Bastia 1
 Santomanco 1 — Rota 5 — Camelli 5
 — Jotti 1 — Vergani 1 — Valli 5
 Pozzi 5 — Bianchi 1 — Torreggiani 2
 — Bodra 1 — Saviotti 1 — Acquati 2
 — Arienti 5 — Totale L. 72.

Si raccomanda caldamente ai samideani di sottoscrivere numerosi perchè il vessillo riesca degno del maggior gruppo esperantista d'Italia.

Istituto Lombardo d'Esperanto

Via Rossari, 2 - MILANO - 2. Via Rossari
 Offerte Ricevute:

Camelli Pina	» 50.
Combi Teresa	» 50.
Comolli Maria	» 50.
Pomarici Domenica	» 50.
Coato	» 50.
Castiglioni Giulio	» 10.
Berino Andrea	» 10.
Busso Giovanni	» 10.
Gorla	» 10.
Frontosi	» 5.
Comotti	» 5.
Dr V. L'Acqua	» 4.

Totale L. 304. -

Vivi ringraziamenti!

SOTTOSCRIZIONE PERMANENTE

per la diffusione dell'Esperanto in Italia e Colonie (Konstanta monoferado por la divastigo de Esperanto en Italujo kaj en gaj Kolonioj.)

Sig. I. Piatti	L. 2.50
Prof. G. Meazzini	» 50.—

GAPPUCINI FRANCESCO, *Gerente responsabile*
 Milano, Tip. A. REDAELLI - Via G. Galileo, 39.

BOLLI DI PROPAGANDA

ASSORTITI

Lire 1.00 al cento Lire 8.00 al Mille



Dokt. L.L. Zamenhof



*Sed distalos la abstinaĵ baraj.
Per la sankta amo dobeliĝaj*

Ĉe **ISTITUTO LOMBARDO D'ESPERANTO — MILANO**

Via Rossari, 2

F. A. R. E.

ANONIMA SOCIETO

FABRIKO DE ELEKTRAJ HEJTIGILOJ

Patentoj Amleto Selvatico

Società Kapitalo L. 5.000.000 tute pagita

Elektraj termoforoj - Gladilo - Ĉiuspecaj boligiloj
el $\frac{1}{4}$ ĝis 20 litroj - Fornoj - Centraj hejtadiloj -
Fornetoj - Kruĉetoj - Litvarmigiloj - Kafujoj - Teujoj
- Varmigiloj por tolaĵo kaj por banujoj - Rapidaj
varmigiloj (Termorapidi) - Steriliziloj - Gluvarmigiloj
- Lutiloj - Industriaĵoj fornoj. :: :: :: :: ::

KOMPLETAJ INSTALAĴOJ INDUSTRIA

Fabriko kaj Administrejo

MILANO

Via Pietro Marocelli, 14 - Telef. 10-619

Provizejo por Milano

kaj Lombardio

Via Dante, N. 10 - MILANO

Jus aperis :

Una Partita a scacchi

— de G. GIACOSA —

esperantigita - de fratoj Petro kaj Rinaldo Padulli

L. 3 —

Ĉe ISTITUTO LOMBARDO D'ESPERANTO - MILANO

Via Rossari, 2